

Wilhelm Müller,

## Ĉe puto antaŭ l'urbo

*tradukita de Ludwig Emil Meier (kaj aliuloj)*

Ĉe puto antaŭ l' urbo  
jen staras la tili',  
en kies ombro dolĉe  
revadis ofte mi.  
Mi tranĉis en la ŝelon  
amsignojn pro memor';  
sopir' min tien logis  
en ĝojo kaj dolor'.

En lasta nokto pasis  
mi preter la tili',  
sed malgraŭ la malhelo  
okulojn fermis mi.  
Jen ĝiaj branĉoj muĝis  
kaj ŝajnis logi min:  
"Restadu, ho migrulo,  
ni trankviligos vin!"

La vento kontraŭblovis,  
ĉapelon ŝiris for.  
Sed pelis min antaŭen  
turmentoj de la kor'.  
Se plue mi vagadus  
eĉ ĝis la monda fin',  
la branĉoj ĉiam logus:  
"Ni trankviligos vin!"

...

*Traduko de la Germana poemo "Der Lindenbaum" de WILHELM MÜLLER (\*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de Ludwig Emil Meier (kaj aliuloj).*

*Arg-83-164 (2003-11-09 21:14:39)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la germana Esperanto-lernolibro "Post la kurso" de WILHELM kaj HANS WINGEN, sur paĝo 68. Sube estas indikite tie: "Laŭ L. E. Meier k. a.". El tio oni povas konkludi, ke ĝi ne estas la origina tradukversio de L. E. MEIER kaj ke ĝi estas iom ŝanĝita de aliuloj, eble de la fratoj WINGEN mem.*